
^{15:10} Se vi observos miajn ordonojn, vi restados en mia Amo tiel same, kiel Mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en Lia Amo.

^{15:11} Tion Mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena.

^{15:12} Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas.

^{15:13} Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj. ^{15:14} Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas. ^{15:17} Kaj Mi tion ordonas: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis.

⁴ **Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito** — En ĉi tiu kaj en aliaj verkoj pri la Kvara Revelacio, la leganto trovos la nomojn Legio de Bona Volo — LBV (www.bonavolo.com) — kaj Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito (www.religiodedio.org), kreitajn de la karmemora Alziro Zarur (1914-1979), kiuj kuniĝas por agado “*por ia pli bona mondo kaj por ia pli feliĉa homaro*”. Ili estas du institucioj senlime ekumenaj, kuniĝintaj por tutece zorgi pri fundamentaj bezonoj de la homo kaj de lia Eterna Spirito, transformante lin sen troprotektaj agoj, por ke li mem povu alpreni en la socio sian rolon de protagonisto, en la solvado de problemoj. Ili tiel agas por ke la homo kresku per la potencaj instruoj de la Spirito (Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito) kaj per dinamika agado por homa kaj socia reformo (Legio de Bona Volo), kio estas natura konsekvenco de nia integriĝo en la diajn regulojn. Jesuo diris: “*Celu unue la Regnon de Dio kaj Lian Justecon, kaj ĉio tio, kio estas materia [do homa kaj socia] estos aldonita al vi.*” (Evangelio de la Kristo laŭ Mateo, 6:33). El de kongruiĝo de tiaj agadoj — la spirita kaj la socia, homa — naskiĝis la Politiko de Dio, por la Eterna Spirito de la homo. La Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito estas konata ankaŭ kiel Religio de la Tria Jarmilo, Religio de la Universala Amo kaj Dia Religio.

15:15 Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de mia Patro, Mi sciigis al vi.

15:16 Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo.

15:17 Tion Mi ordonas al vi: ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. 15:9 Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo”.

(Traktaĵo pri la Nova Ordonado de Jesuo⁵, kunigita de Paiva Netto, konforme al la Sankta Evangelio de la Kristo de Dio laŭ Johano, 13:34 kaj 35; 15:7, 8, 10 ĝis 17 kaj 9.)

⁵ **Traktaĵo pri la Nova Ordonado de Jesuo** — Pro la spirita forto, kiun posedas tiuj vortoj de la Kristo de Dio, Paiva Netto ordonis la legadon de tiu Traktaĵo okaze de la malfermo de ĉiuj programoj de Supera Reto Bona Volo de Komunikado (radio, televido kaj interreto) kaj en la publikaĵoj, kaj ankaŭ en publikaj kunsidoj de la Religio de la Tria Jarmilo, kaj per tio li plenumis peton de la Spiritaj Fratoj de la Monda Revolucio de la Lumaj Spiritoj, en la Kvara Revelacio, reprezentataj de Frato D-ro Bezerra de Menezes (Spirito).

LA MISTERO DE DIO REVELACIITA

La Mistero de Dio, de Jesuo Kristo revelaciita, estas Amol⁶

La aŭtoro

⁶ Ĉi tiu penso de Paiva Netto estas la lasta verso de lia muzikaĵo titolita *La Nova Ordon de Jesuo*, kiu estas parto de la Oratorio “La Mistero de Dio Revelaciita”, kiu estis sonregistrata, en la jaro 1998, fare de Nacia Filharmonia Koruso “Svetoslav Obretenov” kaj de Simfonia Orkestro de Sofio, el Bulgarujo, sub la reĝisorado de **Ricardo Averbach**. Disponebla en *streaming* platformoj (*Boa Vontade Play, Spotify kaj Deezer*), tiu Oratorio superis la nombron de 500 mil kopioj venditaj, kaj ricevis la premion Platina Duobla Disko. Je la 5-a de Aprilo 2000, okazis ĝia unua monda prezento en la angla lingvo, kiam la Ekumena Koruso Bona Volo sin prezentis en la sidejo de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), en Novjorko, Usono.

DAŬRA ĈEESTO DE JESUO

Ĉio pasas for. Jesuo, la Ekumena Kristo kaj Dia Ŝtatestro, plu restas! Li diris: *“La Ĉielo kaj la Tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos”* (Evangelio laŭ Luko, 21:33).

La aŭtoro

LA OPINIO DE GAMALIEL

“Se ĉi tiu laboro estas de homoj, ĝi renversiĝos; sed se ĝi estas de Dio, vi ĝin ne povos renversi; aŭ eble iel vi troviĝos batalantaj kontraŭ Dio.”

Gamaliel (Agoj de la Apostoloj de Jesuo, 5:38 kaj 39)

ANTAŬ LA SINEDRIO

“Petro kaj Johano responde diris al sinedrianoj: ‘Ni ne povas ne paroli pri tio, kion ni vidis kaj aŭdis. Oni devas obei Dion prefere ol homojn’.”

*(Agoj de la Apostoloj de Jesuo, 4:19
kaj 20 kaj 5:29)*

MALFERMO

Pezaj ĉiutagaj zorgoj postulas momentojn de enmemiĝo, serĉe de refreŝigo de la Animo, fonto de forto por la venko. Kiam ni enviciĝas por la konstruado de ia nova mondo — tre urĝa, fronte al la absurdaĵoj nuntempaj —, tiu defia irado pleniĝas per lumo, kiam nia batalado por Bono trovas resonon je la venka saĝeco de aliaj batalantoj.

Laŭlonge de jardekoj, la brazila radikronikisto, ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto daŭre alportadis al la popolo meditojn de Paco, per radio, televido, interreto kaj pluraj publikaĵoj. El lia obstina sindediĉo al Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro, favore al la feliĉo de la Eterna Spirito de la homo, naskiĝas vortoj, kiuj inspiras la Animojn al senlaca praktikado de Bono kaj stimulas ilin al tio, ke oni neniam rezignu pri sennombraj justaj celoj.

Tial, faru investon je vi mem: rezervu valorajn minutojn por mediti pri ĉiu el la 101 saĝaj lecionoj de ĉi tiu libro kaj revigliĝu por la aŭroro de novaj tempoj, kiu ekaperas danke al via solidara agado, aldone al frataj faroj de multaj mondaj civitanoj.

Bonan legadon!

La eldonantoj

1

Feliĉo sur la Tero konsistas en tio, ke oni plenumas tion, kion ni promesis en la Ĉielo.

2

Ne ekzistas neblaĵoj por tiu, kiu metas sian fidon sur Jesuon.

3

Jesuo ne estas ekskluziva de Kristanismo, sed Li estas la Kapo de la homaro. La Kristo staras super ĉiaj malsamecoj, super ĉiaj dividoj, super ĉio, kio disigas. Li estas unueco.

4

Fido estas saĝo, kiu devenas de Dio; Bonaj Agoj estas ĝia praktikado.

5

Espero neniam mortas. Kial?! Ĉar Jesuo estas la Espero! Laŭdata estu Dio!

6

Karitato estas konfirmo pri la plej alta potenco de la Animo.

7

Karitato estas la spirita magio, kiu povos fari, ke ia politikumado ne plu estu hontiga. Vera politikisto devas ami la civitanojn, ĉar li influas iliajn vivojn.
Karitato estas sinonimo de Amo.

8

La Vizaĝo de Dio estas Amo. Ju pli ni amas, des pli Li manifestiĝas en ni.

9

Intuicio estas la Inteligenteco de Dio en ni.

10

Preĝo estas nutraĵo por la Animo, kaj Amo, substanco por Justeco kaj Paco.

11

Venko estas plej taŭga respondo al ĉiu ajn krizo.

12

Preĝado nin suprenlevas, laboro nin realigas.

13

Administri estas alveni anticipe!

14

Preĝo, kiu plej plaĉas al la Kreanto, estas respekto al Liaj kreaĵoj.

15

Amikeco, kiu naskiĝis en porĉiama idealo de Bonfarado, neniam malaperos.

16

La Vivo estas konstanta submetiĝo al la kontrolo de tribunalo de la konscienco, el kiu neniu eskapas, eĉ se oni ne elmontras tion.

17

Animo ne staras nur tie, kie ĝi vivas, sed ankaŭ tie, kie ĝi amas. Al la koro ne ekzistas nesupereblaj distancoj.

18

Konstruu vian estontecon sur firma roko nomata Jesuo, kaj via Animo neniam skuiĝos, eĉ fronte al plej malbonaj travivaĵoj.

19

Ĉiu spaco konkerita de Amo estas perdita de malamo.

20

Ĉiam, kiam vento de ŝanĝoj skuas arbojn, falas de sur ili fruktoj de forpasinta tempo.

21

Karitato estas Paco al ĉiuj kaj Paco al si mem.

22

Dio estas Dia Kompatemo, kiu alĝustigas impertinentajn pesimistojn.

23

Kiu emas fari ĉion pro Amo, tiu efektive ĉion faras tre bone.

24

Dio juĝas nin laŭ tio, kion ni faras aŭ ne faras, neniam laŭ tio, kion oni parolas pri ni.

25

Dio semas Sian Amon kie Liaj kreaĵoj ekzistas. Sekve, dependas de ili kultivi aŭ ne kultivi ĝin.

26

Kiam oni preĝas, tiam la Animo spiras kaj fekundigas la spiritan kaj homan vivon. Preĝi estas esence grave por sennebuligi la horizonton de la koro.

27

Malfacilaĵoj estas premioj de Dio al nia inteligenteco.

28

En familio devas flori plej dolĉaj kaj sublimaj sentoj de la homo.

29

Ekumenismo estas Universala Deziro vivi pace.

30

Ni sciu travivi la unuecon en diverseco, por ke ni kune venku la malfavorecon.

31

Amo estas kuraĝa ago. Tio estis ekzemplo, kion Jesuo donis al ni. Ĝi estas la plej inteligenta Politiko, kiun homo povas koncepti.

32

Dum oni plendas, oportunaj okazoj perdiĝas.

33

Estas esence grave, ke ni ĉiuj komprenu, ke humileco estas la scienco pri kuraĝo.

34

Plendi ne utilas. Batalado estas tio, kio donas al ni altvaloran ŝancon por progreso.

35

Jesuo deziras, ke ni eliru el finiĝemo kaj kresku en senfinon.

36

Plibonigu vin, kaj ĉio pliboniĝos por vi. Sed plibonigu vin kun Jesuo!

37

Kiu fidas Jesuon, tiu ne perdas sian tempon, ĉar Li estas la Granda Amiko,
kiu ne forlasas amikon meze de la vojo.

38

Nenio rezultas, se oni fermas la okulojn fronte al iu problemo. Pli saĝe
estas transformi ĝin en venkon.

39

Ne inventu problemojn; realaj problemoj ĉiam aperadas. Kaj kun Jesuo ni
ĉiam venkos ilin, ĉiam, ĉiam!

40

Ne ekzistas netranspaseblaj baroj ĉe nia horizonto, ĉar nia horizonto estas
Jesuo!

41

Oni neniam konstatis, ke Jesuo ne respondis al peto de sentema Animo.

42

Amo estas la granda ĉampiono de plej malfacilaj bataloj. Ĝi superas ĉiajn
suferojn. Ĝi estas Dio.

43

Ni ne estu nur folioj, sed ankaŭ fruktoj. Arboj, kiuj donas ombron, sed ankaŭ nutru.

44

La koro fariĝas pli aŭskultema, kiam Frateco estas efektive la fundamento de la dialogo.

45

Neniu sukcesas kateni la Animon de tiu, kiu posedas koron spirite liberan.

46

La miraklo, kiun Dio atendas de homaj kaj spiritaj estuloj estas tio, ke ili lernu sin ami reciproke.

47

Ni neniam staras solaj sur ĉi tiu mondo. Jesuo estas nia forto.

48

La horizonto de tiu, kiu havas Fidon kaj certecon pri Dio, ne konas limojn.

50

49

Plej granda parolado de homo estas liaj agoj.

50

Kio subtenas nin estas la kompatemo de Jesuo!

51

Plej granda sufero estas foresto de Amo.

52

Kio skulptas nian Animon, tio estas niaj agoj. Ni estas tio, kion ni pensas,
parolas kaj faras.

53

Preĝi konekte kun Dio, kun la Kristo kaj kun la Sankta Spirito estas ami kaj
agi.

54

Jesuo estas la Dia Gvidanto de Liberaj Animoj.

55

La Spirita Mondo ne estas ia abstraktaĵo. Ĝi estas nevidebla, sed ĝi ekzistas.

56

Pardono estas liberiga dokumento. Pardono liberigas tiun, kiu pardonas.

57

Kiam la Bona Volo de homoj kuniĝas kun la Bona Volo de Dio nenio plia fariĝos nerealigebla.

58

La tuta mondo eble estas kontraŭ vi. Sed se vi montras vian valoron je Bonfarado, vi brilos, iel ajn.

59

Kiam la homo spirite puriĝas, tiam ĉio pliboniĝas ĉirkaŭ li.

60

Kiu scios doni el si mem, tiu el Dio estos inda ĉion ricevi.

61

Kiam ni kongruiĝas kun la Dia Frekvenco, tiam nia koro forte batas pro sento de Paco.

62

Kiu ne aŭdacas por Bono, tiun malbono uzas.

63

Kiam la temo estas Jesuo, ni estas ĉiam agopretaj!

64

Amo estas la sublima esprimo de la Saĝeco de Dio.

65

Libereco sen Ekumena Frateco estas kondamno al ĥaoso.

66

Ju pli proksime al Jesuo, des pli malproksime de problemoj!

67

Se la malfacilaĵoj estas pli grandaj, tiam pli superaj estos niaj kapabloj por ilin venki.

68

Jesuo estas Suno, kiu neniam estingiĝas!

69

Se ekzistas malluma nokto ankaŭ ekzistas brilega mateno.

70

Servi Jesuon ne estas ofero. Ĝi estas privilegio.

71

Ni estas sekuraj en la Dia Sekureco de la sekuraj manoj de Jesuo.

72

La tempo neeviteble pasadas. Ni ne forperdu ĝin. Ni uzu ĝin por praktiki Bonfaradon.

73

Se ni ne superos la hodiaŭajn malfacilaĵojn, eble morgaŭ nin frakazos la “maleblaĵoj”. Do, ek al laboro, dum ankoraŭ estas tempo!

74

Kiam la motivo estas justa, tiam ordinara homo batalas kiel leono. La ordinara homo estas la heroo.

75

Preĝo estas fekundigilo por la Animo. Pro tio, ni devas preĝi por esti abundaj je homaj, sociaj kaj spiritaj realigoj.

76

Esti idealisto por Bono, jes. Sed bonvolu: kun talento kaj pragmatismo. Estas necese havi idealon kaj precipe esti kapabla realigi ĝin por plu meriti la Benon de Dio.

77

Nenfara fido estas krimo. Sekve, ni predikas en la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito Realigantan Fidon, kiu kunigas **Spiritualecon** kaj **spiritualigitan** agadon.

78

Se vi volas esti feliĉa, klopodu iri la vojon de Frata Amo. Feliĉon oni praktikas per Bonaj Agoj.

79

Nur Bonfarado pravigas la homan vivon. Oni konstruas nenion longedaŭran for de natura saĝo, kiu esence signifas ankaŭ Amon.

80

Jesuo estas la Kompasso de nia plej justa Espero. Sen Li, tio estas, sen Realiganta Fido kaj Dia Karitato, ni vivos en vagado sur ŝtormaj maroj de la homa vivo.

81

Kialoj por kunfratiĝo estas pli grandaj ol tiuj kialoj, kiuj nur incitas rankorojn.

82

Bona penso konstruas feliĉan popolon; la negativa ĝin malfortigas. Tial, estas esence grave prilumi la Animon de ĉiu homo.

83

Nenio pli fortigas kaj trankviligas la Animon ol certeco pri plenumita devo. Ĉi tiu estas malnova sed plu aktuala veraĵo.

84

Kiel Suno naskiĝas ĉiutage, tiel same Espero — kiu neniam mortas — renoviĝas ĉiumatene ĉe la horizonto.

85

Kiu praktikas Karitaton, kaj en ĝi persistas, tiu ricevas de Dio Lian Karitaton, tio estas, Lian Senfinan Korfavoron.

86

Ne sufiĉas, ke hieraŭ ni bone agis. Necesas pli bone iri hodiaŭ kaj eĉ pli glorie morgaŭ.

87

En la krizaj momentoj forĝiĝas la grandaj karakteroj kaj aperas la plej multpovaj nacioj.

88

Nenio detenas homon de Dio, nenio, kiam li strebas al praktikado de Bono.

89

Amo estigas simpation. Kaj ĉi tiu estas allogaĵo, kiu neniam pereas, ĝi estas eterna graco de la Spirito. Eĉ morto ne disigas tiujn, kiuj sin reciproke amas. Escepte se okazas memmortigo.

90

Kiam la Spirito bone fartas, ĝi bone sukcesas, eĉ en plej malbonaj situacioj.
Sed se ĝi malbone fartas, tiam ĝi stumblas eĉ ĉe plej favoraj okazoj.

91

Kiu scipovas ami, tiu naskas el si mem ĉiujn talentojn de Dio.

92

Ne tro zorgu pri konkurenco. Ja elvolu vian propran kompetentecon, kaj malgrandiĝos via streĉiĝo.

93

Apokalipso de Jesuo ne estis farita por timegigi per mallumaj vojoj de mistero, sed por prilumi la vojojn de nia vivo, ĉar Apokalipso signifas Revelacion.

94

Nenian feliĉon eblas konstrui sur suferado de kiu ajn homo.

95

Dio kaj Jesuo estas Roko, sur kiu ni povas fidoplene konstrui kaj sekure lerni la Sublimajn Ordonojn.

96

Kiu staras apud la Dia Majstro, tiun nenion timu, eĉ ĉe plej malbonaj momentoj en la vivo.

97

Ekzistas Vivo antaŭ la vivo, sekve ekzistas Leĝoj, kiuj ekzistas antaŭ la homaj leĝoj kaj super ili validas.

98

Kiu sin donis al Dio, tiu krozas sub la sekura Ĉiela Protekto, aŭ ankris sian koron je Lia amema sino.

99

Jesuo, la Dia Profeto, venis sur la Teron por savi la kreaĵojn. Pro tio, ni konstante zorgas pri defendado de la Vivo.

100

Kiel bone estas semi Bonon! La rezultoj ĉiam floras kaj plifortigas la korojn.

101

Dankemo estas sento de Amo, kiu ne forviŝiĝas el la Animo.

BIOGRAFIO

José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikronikisto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de Marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV) kaj prezidanto-predikanto de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito. Efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI) kaj de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter), li estas ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de la Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Ŝtato Rio-de-Ĵanejro, de la Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de la Sindikato de Radiokomunikantoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de la Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Li partoprenas ankaŭ en la Akademio de Beletro de Centra Brazilo. Li estas aŭtoro por internacia referenco pri defendado de homaj rajtoj kaj konceptado de la idealo de Ekumenaj Civitaneco kaj Spiriteco, kiuj laŭ li estas *“lulilo de plej grandanimaj valoroj, kiuj naskiĝas en la Animo, nome en la loĝejo de emocioj kaj de rezonkapablo prilumita de intuicio, medio, kiu enhavas ĉion, kio transcendas la vulgaran kampon de materio kaj devenas de la homa sublimita sentemo, kiel ekzemple Vero, Justeco, Kompatemo, Etiko, Honesteco, Grandanimeco kaj Frata Amo. Resume, ĝi estas la matematika konstant-nombro, kiu harmoniigas la ekvacion de vivo spirita, morala, mensa kaj homa. Nu, sen tia scio, ke ni ekzistas en du sferoj, sekve ne nur en la fizika, fariĝas malfacile atingi Socion vere Solidaran, Altruisman, Ekumenan, ĉar ni plu neglektos, ke la scio pri Supera Spiriteco plialtigas la karakteron de la homoj, kaj konsekvence tiu scio kondukas la homojn al la konstruado de Tutplaneda Civitaneco”*.

Inter la multenombraj ricevitaj omaĝoj, oni donis al li la Medalon de la 1-a Centjaro de Brazila Akademio de Beletro (ABL), li estis nomumita Komandoro de la Ordeno Rio Branco, fare de Ministerio de Eksteraj Rilatoj, kaj omaĝita per la Titolo de Komandoro, fare de la Konsilantaro de la Ordeno de Aerarmea Merito, kaj per la Medalo de Paciganto, fare de la brazila Ministerio de Armeo.

Unua filo de **Idalina Cecília de Paiva** (1913-1994) kaj **Bruno Simões de Paiva** (1911-2000) — kiuj havis kiel nuptoatestanton **Dorival Caymmi** (1914-2008) — kaj frato de **Lícia Margarida de Paiva** (1942-2010). Lian infanan kaj junulan aĝojn markis neordinara okupiĝo pri temoj spiritaĵ,

filozofiaj, edukaj, sociaj, politikaj, sciencaj kaj ekonomikaj, krom profunda sento pri helpado al bezonantoj.

Li lernis en la tradicia Kolegio Petro la 2-a, en la ĉefurbo Rio-de-Janeiro, kie li ricevis la titolon Eminentia Lernanto, kaj la omaĝon per bronza plataĵo, en la sidejo de tiu prestiĝa modela lernejo. En la jaro 1956, kiam li estis ankoraŭ adoleskanto, li komencis sian sukcesan vojon flanke de la karmemora fondinto de Legio de Bona Volo, la brazila ĵurnalisto, radikronikisto, verkisto, poeto kaj filozofo **Alziro Zarur** (1914-1979). Paiva Netto estis lia ĉefa asesoro dum preskaŭ kvarono da jarcento. Por dediĉi sin tute al LBV, li forlasis sian inklinon al medicino. Poste, li fariĝis ĝenerala sekretario (posteno, kiu respondas al tiu de vic-prezidanto) de tiu Institucio, kaj post la forpaso de Zarur, li anstataŭis lin.

Komponisto kaj muzikproduktanto, li estis lernanto de instruisto **Homero Dornelas** (1901-1990), helpanto de la eminenta **Villa-Lobos** (1887-1959). Li ellaboris la “Marŝon de la Soldatetoj de Dio” unuafoje luditan je la 21-a de Aprilo 1960, fare de knaboj apogitaj de Instituto São Judas Tadeu, en Rio, kie li kunlaboris kiel volontulo. Tiu prezento estis omaĝo al la urbo Brazilja, kiun la tiama Prezidento de la Respubliko **Juscelino Kubitschek** (1902-1976) inaŭguris en tiu dato.

Kiel gvidanto de Legio de Bona Volo ekde la jaro 1979, li multobligis ĝiajn agadojn en la kampoj de edukado kaj hom-socia plivalorigo, pere de asistejoj de tiu Institucio, kiuj inkluzivas modelajn lernejojn por fundamenta edukado, flegejoj por maljunuloj kaj komunumaj centroj por socia asistado. Tiaj lokoj taŭgas por eĉ pli granda projekto kreita de Paiva Netto, al kiu li sin dediĉadas de longa tempo: Edukado kun Ekumena Spiritualeco, surbaze de avangarda pedagogia linio, kiu proponas ian novan modelon por lernado, kuniganta cerbon kaj koron. Tiu edukpropono, konsistanta el Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de la Ekumena Civitano, estas sukcese aplikata en la instrureto de LBV kaj en la socioedukaj programoj elvolvataj de ĝi.

La idealoj de Bona Volo ne havas limojn kaj entuziasmigas diversajn mondregionojn. Ekde la jaro 1980, ekzemple solidaraj iniciatoj disvastiĝas al LBV de Argentino, Paragvajo, Urugvajo, Bolivio, Portugalujo kaj Usono, kaj tiuj ĉi estas, subtenataj per donacoj de ĉiu loka loĝantaro.

Pro la vasta atingpovo de siaj programoj kaj agadoj, kaj pro la bona kvalito de la farata laboro, Legio de Bona Volo havigis al si la rekonon de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), kun kiu ĝi kunlaboradas de pli ol dudek jaroj. En

la jaro 1994, LBV aniĝis al la Departamento pri Tutmonda Komunikado de tiu internacia organizo, kaj en 1999 ĝi estis la unua institucio el la brazila civila socio, kiu akiris la statuson de ĝenerala konsultanto (maksimuma grado) en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok/UN). En la jaro 2000, ĝi ekpartoprenis la Konferencon de NRO-oj kun Konsultaj Rilatoj por Unuiĝintaj Nacioj (Congo, laŭsignifo en la angla), kies sidejo estas en Vieno, Aŭstrujo, kaj en 2004 ĝi aktivis kiel institucio kunfondinta de la Komitato de NRO-oj pri Spiritualeco, Valoroj kaj Tutmondaj Interesoj en Unuiĝintaj Nacioj.

Legio de Bona Volo aktive partoprenas la ĉefajn konferencojn kaj kunsidojn de UN, kaj kontribuas per gravaj rekomendoj cele al enkonduko de internaciaj, publikaj politikoj. LBV ankaŭ plenumas la taskon mobilizi la civilan socion ĉirkaŭ la Celoj por Daŭripova Evoluigo. La cititaj dokumentoj kaj publikaĵoj, eldonataj en pluraj lingvoj, estas transdonataj al Ŝtatestroj, ministeriaj konsilantoj, internaciaj agentejoj kaj reprezentantoj de la civila socio. Inter tiuj materialoj, elstaras la revuoj *Solidara Socio*, *Paco por la Jarmilo*, *Tutmondigo de la Frata Amo*, *BONA VOLO Daŭripova Elvolviĝo*, *BONA VOLO Virino* kaj *BONA VOLO Edukado*.

Je la 21-a de Oktobro 1989, Paiva Netto fondis en Brazilja, ĉefurbo de Brazilo, la Templon de Bona Volo (TBV), kun la ĉeesto de pli ol 50 mil homoj. Ankaŭ konata kiel Templo de Paco, ĝi estas poluso de la Dia Ekumenismo, kiu proklamas la soci-spiritajn kontakton inter la kreito kaj la Kreanto. Aklamata de la popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj en Brazilja, TBV estas la plej multenombre vizitata monumento en la brazila ĉefurbo, laŭ oficialaj datumoj el la Ŝtata Sekretariejo de Sporto, Turismo kaj Distriĝo en la Federacia Distrikto, kaj ekde sia fondiĝo ĝi akceptas ĉiujare po unu milionon da pilgrimantoj.

Paiva Netto kreis, por diskonigi la Spiritan Civitanecon (koncepto, por kiu li pledas), Superan Reton Bona Volo pri Komunikado (radio, televido, interreto kaj publikaĵoj).

Per siaj libroj, Paiva Netto atingis la signifoplenan nombron de pli ol da 8 milionoj da venditaj kopioj. Li havas ankaŭ artikolojn publikigitajn en ĵurnaloj, revuoj, kaj interretaj portaloj en Brazilo kaj eksterlande, kaj skribis en gravaj komunikiloj, ekzemple: *Diário de Notícias*, *Jornal de Coimbra*, *Correio da Manhã*, *Jornal de Notícias*, *O Primeiro de Janeiro*, *Notícias de Gaia*, *Voz do Rio Tinto*, *Jornal da Maia*, *O Público*, *Campeão das Províncias*, *Audiência* kaj *O Despertar* (Portugalujo); *Time South*, *Jeune Afrique* kaj *African News* (Afriko); *Daily Post* (internacia publikaĵo); *Clarín* (Argentino); *Jornada* kaj *El*

País (Bolivio); *El Diário Notícias* kaj *ABC Color* (Paragvajo); *El País* (Urugvajo); kaj *International Business and Management* (Ĉinujo); kaj *Deutsche Zeitung* (Germanujo).

Pri lia literatura stilo, la usona verkisto **Errol Lincoln Uys** rimarkigis: *“Paiva Netto estas praktika homo, sed samtempe havas animon de poeto”*. Laŭ la difino de la eminenta profesoro, juristo kaj verkisto de traktaĵoj **José Cretella Júnior** (1920-2015), *“li estas tre lerta stilisto, ĉiam aktuala”*. **Valdir Andres**, ĵurnalisto, advokato, fondinto de la periodaĵo *A Tribuna Regional*, en la brazila urbo Santo Ângelo/RS, deklaris ĉi tion: *“Estas grandega honoro akcepti la konceptojn, opiniojn, la brilan plumon de profesoro Paiva Netto en nian ĵurnalon”*. Laŭ la opinio de la majstro de instruistoj **Moacir Costa Lopes** (1927-2010), *“li estas tre talenta verkisto”*.

Korespondado kun la aŭtoro:
Rua Norma Pieruccini Giannotti, 110 • Barra
Funda • São Paulo/SP
CEP 01137-010
Retadreso: PaivaNetto@uol.com.br

Konu pli pri la aŭtoro interrete:
www.PaivaNetto.com/eo
Youtube: PaivaNettovideos
Facebook: PaivaNetto.escritor
Instagram: PaivaNetto.escritor
#MilegasPaivaNetton

Aŭtorrajto © 2020 de Paiva Netto
Eldona produktado: *Elevação-skipo*
Revizio: *Elevação-skipo*
Kovrilo, grafika arto kaj arkivo ePub: *Helen Winkler*

ebook ISBN

Ĉiuj rajtoj de ĉi tiu eldono estas rezervitaj al Eldonejo Elevação.

Rua Doraci, 2-A, sala 101 – Bom Retiro
São Paulo/SP – Brasil [Brazilo] – CEP 01134-050
Tel.: (+5511) 5505-2579
